

BJALISTOKAJ KAJEROJ
ZESZYTY BIAŁOSTOCKIE

BJALISTOKAJ KAJEROJ N-RO 14

*14-a literatura konkurso
„Esperanto ligas homojn. Mia viv-aventuro”*

ZESZTY BIAŁOSTOCKIE NR 14

*14. konkurs literacki
„Esperanto łączy ludzi. Przygoda mojego życia”*

Organizatorzy konkursu „Esperanto łączy ludzi”
Książnica Podlaska im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku
Białostockie Towarzystwo Esperantystów

14. konkurs literacki „Esperanto łączy ludzi. Przygoda mojego życia” odbywa się
pod Honorowym Patronatem Prezydenta Miasta Białegostoku



Honorowy Patronat
Prezydenta
Miasta Białegostoku

ISBN 978-83-66137-89-9

Wydawcy
Książnica Podlaska im. Łukasza Górnickiego
ul. Marii Curie-Skłodowskiej 14A, 15-097 Białystok
www.ksiaznicapodlaska.pl



Białostockie Towarzystwo Esperantystów
ul. Piękna 3, 15-282 Białystok
www.espero.bialystok.pl



Redaktor, sekretarz konkursu
Maria Niemyjska

Jury konkursu
Tomasz Chmielik, Anna Kochaniec, Dorota Szubzda

Projekt typograficzny i skład
Przemysław Wierzbowski

Druk
Partner Poligrafia Andrzej Kardasz
ul. Hurtowa 19, 15-399 Białystok

LURDES OLIVEIRA

Je la fino

Mi nomiĝas Karulo kaj mi rakontos al vi pri mia nuntempa vivo.

Ĉiumatene, kiam mi vekiĝas mi serĉas mian edzinon en la lito, sed ŝi ne estas tie. Mi provas aŭdi la bruon de la infanoj en la domo, sed estas silento.

Tiam mi memoras, ke mi estas 80-jaraĝa viro en maljunulejo. La edzino mortis antaŭ 10 jaroj, la gefiloj ne plu estas infanoj kaj miaj kruroj ne plu obeas mian volon.

Mi kuŝas en la lito ĝis Marko, la junaj flegisto, alvenas. Mi vojaĝas al la pasinteco: mi memoras la feliĉajn tagojn, kiujn mi iam vivis.

„Kiel vi fartas hodiaŭ, Avčjo?” – la voĉo de Marko vevas min de miaj memoroj.

Mi respondas:

„Saluton, Marko. Mi fartas bone, dankon. Ĉu hodiaŭ estas dimanĉo?”

„Jes. Hodiaŭ estas vizitantoj en la maljunulejo. Grava tago por ĉiuj vi, ĉu ne?” – li diras.

Dum Marko banas min kaj vestas min, mi pensas:

„Eĉ niajn nomojn ni ne plu rajtas havi. Ni estas simple geavoj. Krom perdi nian familion, nian viglecon, nian decidkapablon, ŝajne maljuneco signifas perdi nian identecon”.

Marko sidigas min sur rulseĝo, kvankam mi preferus marŝi iomete per helpo de mia lambastono. Sed Marko ne havas tempon. Estas multaj aliaj homoj por flegi.

En granda salono, kune kun aliaj maljunuloj, ni manĝas la kutiman moligitan panon en taso da lakto kvankam ni ja kapablas maĉi kaj nia appetito ne malaperis. Sed ni ne plu rajtas manĝi bongustan manĝaĵon.

Dum la tutaj matenoj, ni sidas silente. Iuj rigardas la laboristojn, kiuj ordigas la ĉambregon, aliaj fermas la okulojn kaj rigardas internen.

„Ili multe laboras ĉi tie. Pro tio, ne estas tempo por babili kun ni” – mi pensas.

Fojfoje sinjorino petegas:

„Bonvolu porti min al la necesejo. Mi bezonas iri tien tuj”.

Sed la respondo ĉiam estas la sama:

„Vi havas vindajon, ĉu ne? Mi ne havas tempon nun. Poste... poste...”

La lastaj vortoj oni apenaŭ aŭdas, ĉar la laboristoj ĉiam hastas fari la plej gravajn taskojn en la maljunulejo: ordigi la dormoĉambrojn, pretigi la manĝojn, purigi la telerojn...

S-ino Espero parolas iomete kun sia najbarino:

„Hodiaŭ, miaj gefiloj vizitos min. Ili venos, mi scias, ĉar ili promesis viziti min ĉiu monate. Eble ili kunportos miajn genepojn. Antaŭ longe mi ne vidas ilin”.

Mi scias, ke ili ne venos. Ili neniam venas. S-ino Espero diras tion semajnon post semajno. Ŝi simple esperas.

La horoj pasas.

Kiam ni vidas, ke oni jam pretigas la tablojn por la tagmanĝo, ni revivas. Nia entuziasmo ne rilatas al la manĝaĵo mem – ĉiam sensala mola io ĝi estas. Dum la manĝo, aliaj homoj estas tie, iliaj voĉoj aŭdeblas, oni eĉ alparolas nin kelkajn frazojn. Ni ekzistas por momente.

„Vi ne rajtas manĝi salon” – diras al ni la kuracisto, kiu aperas unu fojon semajne. „Temas pri hipertensio. Vi ne plu estas infano, vi scias”.

Tiel, la manĝoj ĉiam estas sengustaj.

Posttagmeze estas vizitantoj.

S-ro Luko ridetas, kiam li vidas sian filinon kaj nepinojn aperi ĉe la pordo. Ili babilas gaje, kantas kaj manĝas la bongustan kukon, kiun lia filino kunportis. Estas lia naskiĝtago.

S-ro Luko estas bonŝanca, ĉar lia filino vizitas lin ĉiusemajne. Multaj el ni neniam vidas familiianojn.

Ĉi-dimanĉe estas aliaj vizitantoj, eta grupo da gejunuloj, kiuj vizitas la maljunulejon de tempo al tempo. Ili alparolas nin dum kelkaj minutoj.

„Saluton, avĉjo, kiel vi fartas?” – demandas juna Rakel al S-ino Amanda.

„Tre bone, dankon. Mi atendas mian filon. Li havas multe da laboro, ĉar li estas fama advokato. Li havas tri gefilojn kaj li multe vojaĝas. Pro tio, li ne havas multe da libertempo por veni ĉi tie. Sed li venos hodiaŭ!”.

S-ino Amanda ĉiam pardonas la foreston de sia filo. Si eĉ trovas manierojn senkulpigi lin pro lia porĉiama forgeso.

Rakel karesas la vizaĝon de tiu ĝentila maljunulino, ridetas kaj tuj alparolas alian homon.

„Kaj vi, avĉjo, kiel vi fartas? Ĉu bone?”

„Mia nomo estas Vicento. Mi lacas pro maljunecon kaj suferas je solaco. Sed vi ne kapablas kompreni tion, ĉar vi estas tro junaj” – li respondas.

„Ne zorgu, avĉjo. Ĉi tie oni flegas vin kaj vi ne estas sola. Rigardu, kiom da avinjoj kaj avĉoj estas ĉi tie” – diras Rakel.

Mi rimarkas la malĝojon en la okuloj de Vicento. Li ŝatus rakonti pri sia vivo, siaj aventuroj, sed ne eblas. Rakel jam estas aliloke. Neniu vere volas aŭskulti nin.

„Kia bela avinjo. Ĉu vi bonfartas?” – alia junulo demandas al S-ino Greta.

Si kapjesas kaj tuj diras:

„Mi estas ĉi tie nur portempe. Mia nevino, kiu loĝas proksime kaj havas grandan domon, promesis, ke ni loĝos kune en sia hejmo. Mi nur atendas, ke ŝi venu preni min”.

Mi konas tiun sinjorinon de antaŭ 5 jaroj. Si diras la samon, ĉiam, kiam iu demandas ion al ŝi. Sed ŝia nevino neniam alvenas.

Je la 17-a horo ni manĝas ian specon de kaĉo. Oni promesis al ni, ke ni rajtus manĝi iom da kuko – la kuko, kiun la familio de S-ro Luko lasis por ni ĉiuj. Sed tio ne okazas. Ĉu ili forgesas la kukon en la kuirejo?

Mi demandas: „Ĉu ne estas kuko?”

„Ne. Avĉjo. Pro la diabetoj. Estas tro da sukero en kuko” – iu respondis.

Neniu rajtas manĝi iom da kuko, krom la laboristoj mem.

Denove la silento, la soleco, la malplenaj horoj. Ni atendas la vespermanĝon, la lasta momento de aktiveco en la tago. Poste, la dormoĉambro.

Jam en la lito, mia menso denove vojaĝas al la pasinteco. Mi sopiras pri la vivo, kiu ne plu ekzistas.

Ha! La vivo – kia aventuro!

Tamen, je la fino restas nur memoroj.

*I nagroda w kategorii esperanckiej konkursu literackiego
„Esperanto łączy ludzi. Przygoda mojego życia”*

LURDES OLIVEIRA

Na końcu

Nazywam się Karulo i opowiem Ci o moim obecnym życiu.

Każdego ranka, po przebudzeniu szukam w łóżku mojej żony, ale jej tam nie ma. Próbuję usłyszeć odgłosy dzieci w domu, ale jest cicho.

Wtedy przypominam sobie, że jestem 80-latkiem w domu opieki. Żona zmarła przed 10 laty, moje dzieci już nie są dziećmi, a moje nogi już mnie nie słuchają.

Leżę w łóżku aż do przyjścia Marka, młodego pielęgniarki. Podróżuję w przeszłość: przypominam sobie przeżyte szczęśliwe dni.

„Jak się dziś czujesz, Dziadziu?” – głos Marka wybudza mnie z moich wspomnień.

„Witaj Marku. Czuję się dobrze, dziękuję. Czy mamy dziś niedziele?”

„Tak. Mamy dziś w ośrodku odwiedzających. Ważny dla ciebie dzień, prawda?” – mówi. Podczas gdy Marko mnie kąpie i ubiera, myślę:

„Już nie możemy zachować nawet swoich imion. Jesteśmy po prostu dziadkami. Nie dość, że straciliśmy nasze rodziny, energię, możliwość decydowania, wygląda na to, że starość oznacza utratę swojej tożsamości.

Marko sadza mnie na wózku inwalidzkim, chociaż wolałbym pochodzić trochę o kulach. Ale Marko nie ma czasu. Ma wielu innych ludzi do pielęgnowania.

W wielkim salonie, wspólnie z innymi staruszkami, jem jak zwykle rozmiękkły chleb i piję kubek mleka, chociaż jesteśmy w stanie żuć i nasz apetyt nie znikł. Ale nie mamy już prawa jeść smacznych potraw.

Siedzimy w ciszy cały ranek. Niektórzy przyglądają się pracownikom porządkującym pokoje, inni zamkają oczy patrząc wewnątrz siebie.

„Oni dużo tutaj pracują. Przez to nie mają czasu porozmawiać z nami” – myślę sobie. Czasem jedna pani prosi:

„Zanieście mnie, proszę do ubikacji. Muszę tam iść natychmiast”.

Ale odpowiedź zawsze jest ta sama:

„Masz pieluchę, prawda? Teraz nie mam czasu. Później...”

Ostatnie słowa są ledwo słyszalne, bo pracownik zawsze śpieszy się zrobić najważniejsze obowiązki w domu opieki: uporządkować sypialnie, przygotować jedzenie, umyć talerze...

Pani Espero trochę rozmawia ze swoja sąsiadką:

„Dzisiaj moje dzieci mnie odwiedzą. Przyjdą, wiem, bo obiecali odwiedzać mnie każdego miesiąca. Może przyprowadzą moje wnuki. Już od dawna ich nie widziałam”.

Wiem, że nie przyjdą. Nigdy nie przychodzą. Pani Espero mówi tak co tydzień. Po prostu ma nadzieję.

Godziny mijają.

Ożywiamy się, kiedy widzimy, że przygotowują stoły do obiadu. Nasz entuzjazm nie wiąże się z samym obiadem – zawsze jest to coś miękkiego i niesłonego. Podczas obiadu są tu inni ludzie, słyszać ich głosy, nawet adresują kilka zdań do nas. Przez moment istniejemy.

„Nie wolno wam jeść soli” – mówi nam lekarz, który pojawia się raz w tygodniu.

„Chodzi o nadciśnienie. Wiecie, już nie jesteście dziećmi”.

Dlatego posiłki są zawsze bez smaku.

Po południu przychodzą goście.

Pan Luko uśmiecha się, kiedy widzi swoją córkę i wnuczkę pojawiające się w drzwiach. Wesoło rozmawiają, śpiewają i jedzą smaczne ciasto przyniesione przez córkę. To jego urodziny. Pan Luko jest szczęśliwy, bo córka odwiedza go co tydzień. Wielu z nas nigdy nie widuje rodziny.

Tej niedzieli są inni odwiedzający, mała grupa młodych, która od czasu do czasu odwiedza domy opieki. Przez kilka minut rozmawiają z nami.

„Witaj babciu, jak się masz?” – pyta młoda Rakela panią Amandę.

„Bardzo dobrze, dziękuję. Czekam na mojego syna. Ma dużo pracy, gdyż jest znanym adwokatem. Ma troje dzieci i dużo podróżuje. Z tego powodu ma mało czasu na odwiedziny tutaj. Ale dzisiaj przyjdzie!”

Pani Amanda zawsze wybacz swojemu synowi nieobecność. Nawet znajduje sposób na usprawiedliwienia jego wiecznego zapomnienia.

Rakel głaszcze twarz tej miłej staruszki, uśmiecha się i od razu zgaduje inną osobę.

„A ty dziadku, jak się masz? Dobrze?”

„Nazywam się Vincento. Jestem zmęczony starością i cierpię z powodu samotności. Ale ty nie jesteś w stanie tego zrozumieć, bo jesteś zbyt młoda” – odpowiada.

„Nie zamartwiaj się, dziadziu. Tutaj troszczą się o ciebie i nie jesteś sam. Popatrz, ile babc i dziadków jest tutaj” – mówi Rakela.

Widzę smutek w oczach Vincenta. Chciałby opowiedzieć o swoim życiu, swoich przygодах, ale to niemożliwe. Rakel jest już w innym miejscu. Nikt tak naprawdę nie chce nas słuchać.

„Jaka piękna babcia. Czy masz się dobrze?” – inny młody pyta pani Grety.

„Ja jestem tutaj tymczasowo. Moja siostrzenica, która mieszka w pobliżu i ma duży dom, obiecała, że zamieszkamy razem w jej domu. Tylko czekam, aż przyjdzie i mnie zabierze”. Znam tę panią od pięciu lat – kiedy ktoś ją o coś pyta, odpowiada zawsze tak samo. Ale jej siostrzenica nigdy nie przychodzi.

O godzinie 17 jemy coś w rodzaju owsianki. Obiecano nam, że będziemy mogli zjeść kawałek ciasta, które rodzina pana Luko zostawiła dla nas wszystkich. Ale tak się nie stało. Czy zapomnieli o cieście w kuchni?

Pytam: „Czy nie ma ciasta?”

„Nie, dziadziu. Z powodu cukrzyków. Jest za dużo cukru w cieście” – ktoś odpowiedział.

Nikt nie ma prawa zjeść kawałka ciasta, z wyjątkiem samych pracowników.

I znowu cisza, samotność i puste godziny. Czekamy na kolację, ostatni w ciągu dnia moment aktywności. Potem sypialnia.

Już w łóżku mój umysł znów podróży w przeszłość. Wzdycham do życia, które już nie istnieje.

Och! Życie – co za przygoda!

A jednak na koniec pozostają tylko wspomnienia.

Z esperanta tłumaczyła Maria Niemyjska

*1-a premio en la pola kategorio de la literatura konkursو
„Esperanto ligas homojn. Mia viv-aventuro”*

ANDRZEJ LICZMONIK

La pasio retrovita

Ne facilas akcepti devigan pensiiĝon, kiam oni estas nur kvardek-sepjara. Por multaj, tia aĝo estas la plej bona momento por fari karieron. Postenoj: direktoraj, prezidentaj ministeriaj, avanco por generalo kaj aliaj atributoj de graveco estas malfermitaj al homoj de tiu aĝo. La aliaj, ne revantaj pri gravaj pozicioj, ĝuas respekton pro sia sperto, estas opiniataj kiel fakuloj, kaj iliaj opinioj estas serioze konsiderataj de pli junaj gekolegoj.

Tamen, se tiumomente iu suferas pro grava malsano, kiu malebligas pluan funkciadon en la ĝisnuna sistemo, li similas paperpeceton, hazarde forbloviton de la skribotablo: post unu falo, ĝi jam ne revenos. Ĝi trafos en la rubkorbon, de tie en la grandan rubujon, kaj poste en la rubodeponejon. Kiam vi aĝas pli ol sesdek, tia sorto ŝajnas aspekti tute normala, kvankam multaj ĝin travivas kun malfacilaĵoj. Sed en la aĝo de kvardek sep jaroj!?

Al mi tio okazis, tute neatendite, kvankam jam pli frue estis multaj indikoj, ke mi povu atendi tion pli aŭ malpli frue.

Mia vidkapablo jam ekde la infanaĝo malbonis kaj multaj aferoj, kiuj ĝojigis miajn samaĝulojn, kiel ekzemple biciklado, por mi ne estis atingebla. Spite tiujn problemojn, mi lernis tute bone, do mi sukcesis finstudi kaj komencis labori ĉe skribotablo, pensante ke mi sen pliaj baroj laboros ĝis la emeritiĝo.

Tamen, la vivo planis por mi alian scenaron. Post la 40-a vivojaro, mia vidpovo iom post iom, preskaŭ nerimarkeble, malboniĝadis ĝis

finfine mi ne plu povis labori kun dokumentoj presataj per printiloj el la 1990-aj jaroj, ĉiam pretigitaj por maksimume ŝpari inkon.

La transiro al handikapula pensio estis por mi ŝokiga. Subite, ekankis mono por varoj, kiu ĝis tiام estis por mi atingeblaj, kaj uzado de ili ŝajnis al mi tute natura. Ekzemple ĉiumonataj vizitoj en kinejo aŭ teatro, dusemajna feriado, ktp. Nun en vendejoj oni devis zorge rigardadi ĉiun objekton, pensante ĉu post la aĉeto restos sufiĉe por sin vivteni ĝis la sekva pensiopago.

La unua ideo, kiu venas en la kapon, en tia stato, estas serĉado de nova laboro por gajni mil aŭ du mil zlotojn, necesajn por ekvilibrigi la antaŭan vivonivelon. Mi serĉis longe. Mi provadis ŝanĝi la fakon. De tempo al tempo, aperis mallongaj kontraktoj kaj partotempa, perdistanca laboro. Tio iomete helpis finance, sed mi daŭre estis malkontenta. Mi havis la impreson, ke la vivo ien forkuras kaj se tio pludaŭros, iumomente estos jam tro malfrue por ĝin ekkapti.

Pola Asocio de Blinduloj, al kiu oficisto de la Urba Socialhelpa Centro proponis, ke mi aliĝu, donante al mi handikapatestilon, proponis al mi diversajn trejnokursojn dediĉitajn al homoj perdantaj la vidokapablon, liveris multajn detalajn informojn pri rabatoj kaj rajtoj, kiujn havas homoj similaj al mi, sed mi sentis interne „truon”, kiun post elfalo el la normala profesia aktivado mi ne povis plenigi.

Sed nur ĝis iu tempo.

Post la kvinjara membreco en la Asocio, pere de tiu organizo mi estis sciigita, ke la Tutlanda Centro por Kulturo de Blinduloj organizas kreigajn trejnadojn en la kategorioj de muziko, pentroarto kaj literaturo. Al muziko ĉiam mi havis „lignan” orelon, kaj mi neniam sukcesis atingi bonan noton pro desegnado, kiam mi estis lernanto.

Tamen jam delonge altiris min la verkado. Tiumomente, kiam mi tenis en la mano la avizon pri la trejnado, mi rememoris miajn mult-nombrajn, junularajn provojn min esprimi skriboforme, kiu ĉiam finiĝadis per forĵetado en angulon de la komencitaj teksto. Mankis al mi la fido, ke mi, la masonistofilo, povus iĝi verkisto. Kiel mi kuraĝus starigi min sur la egala nivelo kun Sienkiewicz, Prus aŭ, ekzemple, Hłasko!?

Kiam komenciĝis mia tiel nomata „plenanĝa vivo”, mi tute forlasis pensadon pri literaturo. Mi eĉ forgesis, ke iam en mian kapon venadis tiaj ideoj. Nun, kiam neatendite, aperis ŝanco realigi la junulajn revojn, kaj mi havis nenion por fari, mi decidis, ke indas renovigi la longe forgesitan pasion. Mi malfermis la retan aliĝilon kaj mi ĝin plenigis.

Tiel komenciĝis mia plej granda viaventuro – la aventuro kun literaturo. Kuraĝigita de mia unua sukceso, kiu estis distingo en konkursو, al kiu kuraĝigis min partopreni la trejnadestro, mi komencis verki multe kaj plenentuziasme. La temoj mem venadis en mian menson. Oni devis nur kopii ilin de la kapo en la komputilomemoron.

Nur post malpli ol unu jaro enmane mi tenis mian unuan novelaron, kiu estis eldonita en ducent kvindedek ekzempleroj de la eldonejo gvidata de la direktoro de la Tutlanda Centro por Kulturo de Blinduloj.

Hodiaŭ, dek du jarojn post tiu trejnado, mi tenas jam kvin volumojn, en kiuj troviĝas entute preskaŭ cent tridek noveloj kaj aliaj prozominiaturoj, du romanojn kaj dek tri premiojn kaj distingojn en diversaj konkursoj. Mi partoprenis plurajn aŭtorajn renkontiĝojn en la tuta lando.

Ĉie mi estis varme akceptata de la legantoj. Tiu aventuro daŭras la tutan tempon. Ĉiam al mia menso venas novaj ideoj. Kiam mi eksidas ĉe la komputilo kaj malfermas en la tekstprilaborilo novan dokumenton, mi scias, ke baldaŭ kreigos io, kio pli aŭ malpli frue kondukos la legantojn al fabela, neĉiutaga lando, al renkonto kun aliaj mondoj, por ili de mi, kreataj. Mia revo estas, ke tiu aventuro daŭru ĝis la fino de mia vivo. Mi ne scias kiom da magiaj historioj elsorĉos mia maljuniĝanta cerbo, tamen mi esperas, ke estos almenaŭ tiom, kiom ĝis nun mi kreis. Mi ne plu zorgas pri la „truo”, aperinta post mia profesia kariero. Ĝi estas tute plenigita. Kaj la financoj? Nu, la literaturo kostas pli, ol ĝi alportas. Mi lernis ŝpari, kaj la cirkonstancoj estas tiaj, ke tio, kio necesas, al mi ne mankas. Plej gravas, ke mi havas la pasion, kiu donas sencon al tro frue komencita aŭtuno de mia vivo.

El la pola tradukis Jarosław Parzyszek

*I nagroda w kategorii polskiego konkursu literackiego
„Esperanto łączy ludzi. Przygoda mojego życia”*

ANDRZEJ LICZMONIK

Pasja odnaleziona

Nie jest łatwo pogodzić się z odejściem w odstawkę, gdy ma się czterdzieści siedem lat. Dla wielu to najlepszy wiek na robienie kariery. Dyrektorskie i prezesowskie posady, fotele ministrów, szlify generalskie i inne atrybuty splendoru stoją otworem przed ludźmi w tym wieku. Inni, mniej władczo usposobieni, cieszą się wtedy szacunkiem wynikającym z doświadczenia, mają opinię ekspertów, ich zdanie jest poważniebrane pod uwagę przez młodszych kolegów.

Tymczasem, jeśli komuś akurat w takim momencie życia przytrafia się uszczerbek na zdrowiu, który czyni niemożliwym dalsze funkcjonowanie w dotychczasowym układzie, staje się podobny do świstka papieru przypadkowo zdmuchniętego z blatu biurka: raz spadł, to więcej nie wróci. Trafi do kosza na odpadki, stamtąd do kontenera, a później na wysypisko. Po sześćdziesiątce taki los jawi się jako w miarę normalny, chociaż też przez niektórych ciężko przeżywany. Ale czterdzieści siedem lat!?

Mnie właśnie to się przytrafiło i to dość nieoczekiwanie, chociaż z drugiej strony wiele już wcześniej wskazywało na to, że przedżej czy później mogę się tego spodziewać.

Wzrok zawsze miałem kiepski i od dzieciństwa wiele rzeczy sprawiających radość moim rówieśnikom, jak na przykład jazda na rowerze, było dla mnie niedostępnych. Mimo tych kłopotów nauka szła mi dobrze, więc skończyłem studia i podjąłem pracę za biurkiem, sądząc, że bez żadnych przeszkód dane mi będzie doczekać tam wieku emerytalnego.

Życie miało jednak dla mnie inny scenariusz. Po czterdziestce wzrok stopniowo pogarszał się w sposób prawie niezauważalny, aż w końcu przestałem dawać sobie radę z dokumentami drukowanymi na sprzecie z lat dziewięćdziesiątych, ustawianym zawsze z myślą o maksymalnej oszczędności atramentu.

Przejście na rentę inwalidzką było dla mnie szokiem. Nagle zaczęło brakować pieniędzy na dobra, które dotychczas znajdowały się w moim zasięgu i korzystanie z nich wydawało mi się absolutną oczywistością. Na przykład wychodzenie raz w miesiącu do kina lub teatru, wyjazdy na dwutygodniowe wakacje itp. Teraz trzeba było starannie oglądać każdy artykuł w sklepie i obliczać w myślach, czy po jego zakupie będzie za co żyć na krótko przed następną wypłatą świadczenia.

Pierwsze, co w takiej sytuacji przychodzi człowiekowi do głowy, to poszukać dodatkowego zajęcia i dorobić ten tysiąc albo dwa niezbędne do wyrównania dawnego poziomu życia. Szukałem długo. Podejmowałem próby przekwalifikowania się. Od czasu do czasu trafiały się dorywcze umowy zlecenia, prace zdalne na ćwierć etatu. Finansowo trochę to pomagało, jednak cały czas czułem w sobie jakiś niedosyt. Miałem wrażenie, że życie gdzieś mi ucieka i jak tak dalej pójdzie, w pewnym momencie będzie już za późno, żeby je dogonić.

Polski Związek Niewidomych, do którego wstąpienie zasugerował mi urzędnik z MOPS-u, wręczając orzeczenie o niepełnosprawności, miał dla mnie w ofercie różne szkolenia dedykowane osobom tracącym wzrok, dostarczył wiele szczegółowych informacji o ulgach i uprawnieniach przysługujących ludziom takim jak ja, ale pustki ogarniającej mnie od wewnętrz po wypadnięciu ze zwykłej aktywności zawodowej nie zdołał wypełnić.

Do czasu.

Po pięciu latach przynależności do Związku za pośrednictwem tej organizacji trafiło do moich rąk zawiadomienie, że Krajowe Centrum Kultury Niewidomych organizuje warsztaty twórcze w kategorii muzyki, plastyki i literatury. Do muzyki zawsze miałem „drewniane ucho”, z plastyki w szkolnych czasach też nigdy nie wychodziłem poza naciąganą

tróję. Natomiast do pisania ciągnęło mnie od dawna. Przynajmniej w tym momencie, kiedy trzymałem w dłoni zawiadomienie o warsztatach, uświadomiłem sobie swoje liczne młodzieżcze próby wypowiadania się w tej formie kończące się niezmiennie rzucaniem w kąt rozpoczętych zapisków. Brakowało mi wiary, że ja – syn murarza – mogę zaistnieć jako pisarz. Jak śmiałbym stawiać siebie na równi z Sienkiewiczem, Prusem czy na przykład Hłaską!?

Gdy zaczęło się tak zwane „dorosłe życie”, porzuciłem wszelkie myślenie o literaturze. Nawet zapomniałem, że nigdy chodziły mi po głowie takie pomysły. Teraz, gdy niespodziewanie pojawiła się szansa realizacji młodzieżczych marzeń, a ja nie miałem nic konkretnego do roboty, uznałem, że warto spróbować odnowić dawno zapomnianą pasję. Otworzyłem internetowy formularz zapisów na warsztaty i wypełniłem go.

Tak zaczęła się największa przygoda mojego życia – przygoda z literaturą. Zachęcony pierwszym sukcesem, jakim było wyróżnienie w konkursie, do udziału w którym zachęcił mnie prowadzący warsztaty, zacząłem pisać intensywnie i z zapałem. Tematy same cisnęły się do głowy. Trzeba było tylko przenieść je stamtąd na dysk komputera.

Po niespełna roku miałem już w ręku pierwszy zbiór opowiadań wydany w dwustu pięćdziesięciu egzemplarzach nakładem wydawnictwa prowadzonego przez dyrektora KCKN.

Dziś, po dwunastu latach od tamtych warsztatów, mam na swoim koncie pięć tomików zawierających łącznie blisko sto trzydzieści opowiadań i innych miniaturow przekazów oraz dwie powieści, trzynaście nagród i wyróżnień w różnych konkursach. Wziąłem udział w kilkunastu spotkaniach autorskich na terenie całego kraju. Wszędzie byłem życzliwie przyjmowany przez grono czytelników.

Ta przygoda trwa cały czas. Wciąż przychodzą mi do głowy nowe pomysły. Kiedy siadam do komputera i otwieram nowy dokument w edytorze tekstu, wiem, że wkrótce powstanie coś, co przedżej czy później zaprowadzi czytelniczki i czytelników do baśniowej krainy niecodzienności, na spotkanie z innymi światami, które ja specjalnie dla nich stworzę.

Moim marzeniem jest, aby ta przygoda trwała do końca moich ziemskich dni. Nie wiem, ile jeszcze magicznych historii wyczaruje mój stojący się mózg, ale mam nadzieję, że będzie ich co najmniej tyle, ile powstało do tej pory.

Nie martwię się już o wypełnienie pustki pozostałe po pracy zawodowej. Ona jest wypełniona w nadmiarze. A środki finansowe? No cóż, literatura więcej ich pochłania niż przynosi. Nauczyłem się żyć oszczędnie, a okoliczności tak się układają, że tego, co niezbędne, mi nie brakuje. Najważniejsze, że mam pasję, która nadaje sens przedwcześnie rozpoczętej jesieni mojego życia.

*2-a premio en la Esperanta kategorio de la literatura konkurso
„Esperanto ligas homojn. Mia viv-aventuro”*

JORGE RAFAEL NOGUERAS

La lastaj vortoj de viv-ĝuanto

La kuŝanta maljunulo, mortonta, ekparolis al tiuj, kiuj staris ĉirkaŭ li.

„Se vi estus dirinta al mi kiel junulo, ke mia mortolito estos tiel abunde ĉeestata, mi ne estus kredinta vin”, li diris malforte, kun ironia rideto. „Mia tiama vivo estis ege aventur-plena kaj mi neniam havis ajnan planon por la estonteco. Mi neniam restis en unu sola loko dum longa tempo, traveturante la mondon de oriento ĝis okcidento, de nordo ĝis sudo. Mi vizitis la plej belajn (kaj konfesinde eĉ la plej malbelajn!) lokojn de la planedo, kaj spertis multajn el la mirindaĵoj kiujn nia mondo proponas. Ĉu vi iam vidis akvofalon tiel altan, ke de la malsupro rigardante supren, ŝajnas kvazaŭ la akvo falus rekte de la ĉielaj nubo? Ĉu vi iam gustumis pladon faritan nur el manĝebraj floroj, aŭ surstratajn manĝetojn faritajn el frititaj insektoj?

„Mi faris la plej diversajn kaj hazardajn laborojn por vivteni min: haringo-fiŝisto en la Norda Maro; tritiko-rikoltisto en Barato; rubaĵokolektisto en Tajlando. Tra ĉio, tamen, mi ĉiam klopojis ĝui mian vivon ĝis la lasta guto. Mi multe amoris – kvankam konfesinde mi malmulte amis. La mondo – ne skandaligu, mi petas! – sendube estas prisemita de infanoj miaj pri kies ekzisto mi eĉ ne scias, kaj de iamaj amantinoj kiuj havas nur svagajn sed espereble agrablajn rememorojn pri la patro de siaj idoj.

„Mi vizitis ĉiun landon en la mondo kaj konatiĝis kun centoj da homoj el la plej diversaj kulturoj kaj viv-cirkonstancoj. Mi traveturis tutajn

landojn per motorciklo kune kun homoj kies nomojn mi lernis nur la antaŭan tagon. Mi partoprenis geedziĝfestojn de ĉiaj religioj kaj spertis la plej ekzotajn ritarojn. Mi ebriiĝis kaj festis kun gekamaradoj kies lingvon mi apenaŭ parolis, sed kun kiuj mi tute bone interkompreniĝis. Tamen, ĉu multajn amikojn mi fakte havas? Kiam mia sorto ŝanĝiĝis kaj mi falis en mizeron, neniu el ili helpis min. Ĉu iu el ili eĉ memoros min kiam mi forestos? Ĉu mi entute gravis al iu ajn, aŭ ĉu mi mortos sola, kaj neniu priploros min...?”

Li rigardis ĉirkaŭe, senkonsile serĉante respondeojn, kaj liaj okuloj nebuliĝis. „Eble mi neniam scios...” Lia trista voĉo malfortiĝis ĝis silento, kaj li entute ĉesis moviĝi.

Ĝuste tiam, la ambulancistoj alvenis, kaj la ĉeestantaj scivolemuloj disiĝis por permesi al ili aliri la feblan ĉifonulon kuŝantan senmove sur la frida parko-benko.

„Kion li diraċis, laŭ vi?” unu el la gapantoj demandis al alia post kelkaj minutoj, vidante la helpkuracistojn, jam venkitajn de la morto, zorge enmeti la senhejmulon en nigran plastan sakon.

„Diablo scias! Li parolis en fremda lingvo, el kiu mi komprenis neniion. Tamen, mi supozas, ke tia neniohava almozulo povas nur esti feliĉa pri tio, ke almenaŭ li ne mortis sola...”

*II nagroda w kategorii esperanckiej konkursu literackiego
„Esperanto łączy ludzi. Przygoda mojego życia”*

JORGE RAFAEL NOGUERAS

Ostatnie słowa bon vivanta

Leżący starzec, umierając, zaczął mówić do tych, którzy stali wokół niego.

„Gdybyście mi powiedzieli, kiedy byłem młody, że moje łoże śmierci będzie tak licznie otoczone ludźmi, nie uwierzyłbym”, powiedział słabym głosem z ironicznym uśmiechem. „Moje ówczesne życie było pełne przygód i nigdy nie miałem żadnych planów na przyszłość. Nigdy nie pozostawałem długo w tym samym miejscu, podróżując po świecie ze wschodu na zachód, z północy na południe. Odwiedziłem najpiękniejsze (i wyznam, że także najbrzydsze!) miejsca na planecie i doznałem wielu z cudownych przeżyć, jakie nasz świat oferuje. Czy widzieliście kiedyś wodospad tak wysoki, że patrząc z dołu, wyglądało to tak, jakby woda spadała prosto z niebiańskich chmur? Czy próbowaliście kiedyś dania z samych tylko jadalnych kwiatów albo ulicznych przekąsek ze smażonych owadów?

Aby się utrzymać, podejmowałem się najróżniejszych i przypadkowych prac: rybak łowiący śledzie na Morzu Północnym, żniwiarz pszenicy w Indiach, śmieciarz w Tajlandii. Ale równocześnie, zawsze spijałem życie do ostatniej kropli. Kochałem się dużo – choć przyznaję, że kochałem niewiele. Świat – nie gorszcie się, proszę – jest niewątpliwie pełen moich dzieci, o których istnieniu nawet nie wiem oraz dawnych kochanek, które mają jedynie mgliste, ale mam nadzieję, miłe wspomnienia związane z ojcem swoich dzieci.

Odwiedziłem każdy kraj świata i poznalem setki ludzi z najróżniejszych kultur i w różnych sytuacjach życiowych. Całe kraje przemierzyłem

na motocyklu razem z ludźmi, których imiona poznałem poprzedniego dnia. Brałem udział w uroczystościach weselnych wszystkich religii i doświadczyłem najbardziej egzotycznych rytuałów. Upijałem się i imprezowałem z towarzyszami, których językiem ledwo mówiłem, ale z którymi dogadywałem się doskonale. Czy jednak rzeczywiście mam wielu przyjaciół? Kiedy mój los się odmienił i popadłem w nędzę, nikt mi nie pomógł. Czy któryś z nich w ogóle będzie o mnie pamiętał, kiedy mnie już nie będzie? Czy w ogóle byłem dla kogoś ważny, czy też umrę samotnie i nikt nie będzie mnie opłakiwał...?”

Rozejrzał się dookoła bezradnie szukając odpowiedzi, a jego oczy zaszczyły mgłą. „Może nigdy się nie dowiem...” Smutny głos ucichł i zupełnie przestał się ruszać. Właśnie w tym momencie przybyli sanitariusze i ciekawscy rozstąpili się, aby umożliwić im dostęp do wątłego, obdartego mężczyzny, leżącego bez ruchu na zimnej parkowej ławce.

„Co on tam gadał, jak myślisz?” – zapytał jeden z gapiów drugiego, widząc, jak ratownicy pokonani przez śmierć ostrożnie wkładają bezdomnego do czarnej plastikowej torby.

„Diabli wiedzą! Mówił w obcym języku, nic z tego nie zrozumiałem. Jednak taki żebrak bez grosza, może się tylko cieszyć, że przynajmniej nie umarł sam...”

Z esperanta tłumaczyła Maria Niemyjska

*2-a (egala) premio en la pola kategorio de la literatura konkurso
„Esperanto ligas homojn. Mia viv-aventuro”*

GRAŻYNA KULESZA-SZYPULSKA

Katharsis

Julio 1978. Abiturienta ekzameno plenumita, enirekzamenoj por la studoj – ne. Baldaŭ oni devos entrepreni decidojn gravajn por la vivo. Dume nenionfarado kaj biero trinkata sekrete antaŭ la gepatroj. La tempo de sindeteno. En la antaŭĉambro sonoras telefono.

- Al vi – diras la patrino.
- Nevolonte mi levas min de sofolito.
- Halo – mi murmuras en la aŭskultilon..
- Saluton. Estas vi? – voĉo de iama kolego el klaso.
- Mi. Kion?
- Ĉu vi havas tempon?
- Dependas kiom.
- Tri semajnojn.

La kolego kun la alia ricevis klasikan proponon nemalakcepteblan. Ili devas kompletigi grupon, kiu reprezentos vejvodion (tiam – unu el 49) dum Skolta Kultur-Festivalo de la Lernantaro en Kielce. Okazis al mi kelkfoje en la lernejo deklami ion kaj partopreni enscenigojn, tial mi ricevis la proponon de la forveturo. Des pli ke ne estis multaj volontuloj.

Ni sukcessis kolekti ok personojn kaj neniu instruiston. Ili tute ne emis veturi por tri semajnoj al Kielce. Oni konstatis, ke ni estas plenkreskaj kaj ni sukcesos elturniĝi el malfacilaĵoj. Oni enigis nin en la liveraŭton Nysa, oni donis al ni bezonatajn aĵojn (en tio kelkajn tolajn monaĥajn vestaĵojn) kaj oni ordonis al la ŝoforo veturi. Kaj jen ni alvenis,

ni prezentis spektaklojn, poeziajmuntaĵojn kaj aliajn aĉajn prezentaĵojn, ni estis la reprezentantoj kaj ni revenis kun ĉiu korpoparto.

Kaj jen mi priskribos al vi unu el tieaj aventuroj... Aŭskultu...

Nia kolego elpensis aranĝon, artan eventon, kiu estis skuonta la konscienccon. Ambician kaj postulantan konsenton de kelkaj gravaj institucioj, en tio – milico. Dum du semajnoj ni sukcesis ilin ricevi kaj ni povis agi.

Por nia dispono oni donis al ni kelon de domo de la publika utileco. Kanjo kaj Banjo ekstere de la konstruaĵo instigis homojn partopreni en la evento. Volontulo komence estis subskribinta konsenton kaj poste oni gvidis lin en la kelon. Oni malsuprenirigis lin singardeme per ŝuparo en malhelo. En la fino atendis lin surprizo. – Manojn malantaŭen! – siblis vera milicisto en civila vesto kaj estis enkateniganta la homon. Forte premante la ŝultron li gvidis lin antaŭ nekonatan vizaĝon.

Maĉjo ŝaltis lampeton. La lumo bategis rekte en la okulojn.

– Nomon! Familian nomon! Naskiĝdaton.

Sidante dorsturnita al ili, mi tajpis ion ajn per mana skribmaŝino.

Post plenumo de formalajoj la milicisto dekatenis la „spektanton” kaj oni gvidis lin en unu el kelaj ejoj, kiun oni ŝlosis per pendoseruro, plej granda de vidataj de mi en la vivo. Tie li povis trunkvile atendi la aliajn kaj aŭskulti la diskon de Czesław Niemen „Katharsis”. Tiel kelkfoje, de la komenco ĝis la fino. Andreo, en la monaĥa vestaĵo, gardanta la kelon, zorgis ke ne estu silento kaj renversadis la diskon de unu flanko sur la alian, ja ni uzis la gramofonon „Bambino”. Kolektado de la grupo ne postulis multan tempon. Kiam ni jam havis bezonatan nombron, ni dankis al milicistoj por la helpo kaj ni komencis la duan parton de la aranĝo. Vestitaj en la monaĥaj vestaĵoj ni stariĝis antaŭ la malliberigoj kaj eldiris kelkajn monologojn pri tio, ke la plej granda peko de nia jarcento estas indiferenteco. Ni parolis pri manko de amo, toleremo. Estis tekstoj pacifismaj.

La homoj aŭskultis. Poste ni foriris. Revenis Maĉjo. – Vi povas kompreneble foriri de ĉi tie. Tamen sub unu kondiĉo. Kiu volas foriri, devas subskribi kondamnon por la morto de la kunsidantoj en la kelo. Bonvolu voki nin – li diris kaj svingis per paperkartoj kun la kondamnoj.

En la kelo ekregis silento. Ni staris proksime atendante alvokon. Silento.

Finfine ni aŭdas:

– Homoj, mi ne eltenos! Mi pardonpetas vin, indulgu min, sed mi devas foriri. He, venu ĉi tien, mi subskribos.

Juna viro subskribis la verdikton kaj demandis premante la genuojn:

– Kie estas necesejo!?

La aliaj ne moviĝis.

Ni rigardis horloĝojn. Estis finiĝanta la luo-tempo de la kelo. Kion fari? Kial ili ne foriras? Ja tio estas nur ludo... Ja tio estas nur teatraĵo... Ja ĉio estas konvencia...

Kune kun Kanjo en iu ejo ni trovis balailojn kaj sitelojn.

Ŝajnigante ordigantan anaron ni liberigis la „spektantojn”.

Ili estis forirantaj trunkvile rigardante nin. Sur kelkaj vizaĝoj videblis rideto, kelkaj rigardis planken. Iu laŭte suspiris. Iu frapetis mian ŝultron.

– Vi havas bonan kapon, infanoj – li diris.

Neniu havis postulojn.

Kiam ni forlasis la kelon, ekstere brilis forta julia suno. La milicistoj en sia aŭto atendis nin.

– Kiel sukcesis la teatraĵo?

– Bonege!

Ili enaŭtigis nian ilaron kaj veturigis nin al la logloko.

Nur vespere, kiam malaperis la arta streĉo, ni povis festi nian sukcesson. Ĉar malgraŭ ke nemultaj sciis pri la aranĝo, malgraŭ ke ĝi ne reehis per skandalo aŭ aliaj resonoj, ni havis la senton, ke ni plenumis gravan mision. Konsidere al ni mem, kaj al la personoj fermitaj en la kelo.

Ankoraŭ estas iu espero por tiu ĉi mondo, se homoj, eĉ en konvencia formo, eĉ en konvencio de arto, de prezentaĵo, spektaklo, ne volas subskribi mortverdikton por tute fremda homo.

El la pola tradukis Grażyna Barszczewska-Banel

*II nagroda (ex aequo) w kategorii polskiej konkursu literackiego
„Esperanto łączy ludzi. Przygoda mojego życia”*

GRAŻYNA KULESZA-SZYPULSKA

Katharsis

Lipiec 1978. Matura zdana, egzaminy na studia nie. Zaraz trzeba będzie podjąć ważne życiowe decyzje. Póki co lenistwo i pite w swoim pokoju, ukradkiem przed rodzicami, piwo. Czas zawieszenia w próżni. W przed-pokoju rozlega się dzwonek telefonu. – Do ciebie – mówi mama.

Niechętnie wstaję z wersalki. – Halo – mruczę do słuchawki. – Cześć. To ty? – głos byłego kolegi z klasy. – Ja. Czego? – Masz czas? – Zależy ile. – Trzy tygodnie.

Kolega wraz z drugim kolegą otrzymali klasyczną propozycję nie do odrzucenia. Mają skompletować ekipę, które będzie reprezentowała województwo, (jedno z 49 ówczesnych) na Harcerskim Festiwalu Kultury Młodzieży Szkolnej w Kielcach. Zdarzało mi się czasami w szkole coś recytować i brać udział w jakiś inscenizacjach, zatem propozycję wyjazdu otrzymałam. Tym bardziej, że wielu chętnych nie było.

Udało się zebrać osiem osób i żadnego nauczyciela. Tym to dopiero nie chciało się jechać na trzy tygodnie do jakiś Kielc. Uznanano, że wszyscy jesteśmy pełnoletni i poradzimy sobie. Wsadzono nas do nyski, dano sprzęt towarzyszący (w tym kilka parcianych habitów) i kierowcy kazano jechać. I tak oto dojechaliśmy, wystawialiśmy spektakle, montaże poetyckie i inne badziewiaste przedstawienia, reprezentowaliśmy i wróciliśmy ze wszystkimi częściami ciała.

I oto dziś opiszę wam jedną z wielu kieleckich przygód... Posłuchajcie...

Nasz kolega wymyślił performance lub happening, takie wydarzenie artystyczne, które miało wstrząsnąć sumieniami. Ambitne i wymagające zgody paru ważnych czynników, w tym – milicji. W ciągu dwóch tygodni udało się takie coś uzyskać i mogliśmy działać.

Do naszej dyspozycji oddano piwnicę w jednym z domów użyteczności publicznej. Kaśka i Baśka na zewnątrz budynku namawiały ludzi do wzięcia udziału w wydarzeniu. Chętny najpierw podpisywał zgodę, a potem prowadzono go do owej piwnicy. Sprowadzano w ciemności, ostrożnie po schodach. Na końcu czekała niespodzianka:

– Ręce do tyłu! – syczał autentyczny milicjant po cywilnemu i zakuwał człowieka w kajdanki. Ścisając za ramię prowadził przed nieznane oblicze.

Maciek zapalał lampkę. Światło waliło prosto w oczy. – Imię! Nazwisko! Data urodzenia.

Odwrócona do nich tyłem wystukiwałam byle co na ręcznej maszynerie do pisania.

Po wypełnieniu formalności „widza” milicja rozkuwała i prowadzono go do jednego z piwnicznych boksów, który zamkano na największą kłódkę, jaką kiedykolwiek w życiu widziałam. Tam mógł sobie spokojnie poczekać na innych i posłuchać płyty Czesława Niemena „Katharsis”. Tak kilka razy, od początku do końca. Andrzej, w habicie, pilnujący piwnicy dbał, by ciszy nie było i przekładał płytę z jednej strony na drugą, wszak na gramofonie Bambino ją odtwarzaliśmy.

Zebranie grupy nie zabrało nam wiele czasu. Kiedy była już wystarczająca ilość, podziękowaliśmy milicji za pomoc i zabraliśmy się za drugi etap happeningu. Ubrani w habitы stanęliśmy przy uwięzionych i wygłosiliśmy kilka monologów o tym, że największym grzechem naszego stulecia jest obojętność. Mówiliśmy o braku miłości, tolerancji. Były teksty pacyfistyczne.

Ludzie słuchali.

Potem odeszliśmy. Wrócił Maciek. – Możecie oczywiście wyjść stąd. Ale pod jednym warunkiem. Kto chce wyjść, musi podpisać wyrok śmierci

na pozostałych siedzących w tej piwnicy. Proszę nas zwołać – powiedział i pomachał kartkami papieru z wyrokami.

W piwnicy zaległa cisza. Staliśmy w pobliżu czekając na przywołanie. Cisza.

Wreszcie słyszymy:

– Ludzie, ja nie wytrzymam! Przepraszam was bardzo, wybaczcie mi, ale muszę wyjść. Hej, wy, chodźcie tu, podpiszę.

Młody facet podpisał wyrok i zapytał ściskając kolana:

– Gdzie jest toaleta!?

Pozostali nie ruszali się.

Spojrzeliśmy na zegarki. Kończył się właśnie czas wynajęcia przez nas piwnicy. Co robić? Dlaczego nie wychodzą? Przecież to tylko zabawa... Przecież to tylko takie przedstawienie teatralne... Przecież wszystko jest umowne...

Wraz z Kaśką odnalazłyśmy w jednym z pomieszczeń szczotki na kiju i wiadra. Udając ekipę sprzątającą, uwolniłyśmy „widzów”.

Wychodzili spokojnie patrząc na nas. Po niektórych twarzach błakał się uśmiech, inne patrzyły w podłogę. Ktoś głośno westchnął. Ktoś poklepał mnie po ramieniu. – Macie łeb dzieciaki – powiedział.

Nikt nie miał pretensji.

Kiedy opuściliśmy piwnicę, na zewnątrz świeciło mocne lipcowe słońce. Milicjanci w „suce” czekali na nas. – I jak udało się przedstawienie? – Super!

Zapakowali nasz sprzęt do auta i odwieźli do miejsca zakwaterowania.

Dopiero wieczorem, kiedy całkowicie uszło z nas artystyczne napięcie, mogliśmy świętować sukces. Bo choć niewielu wiedziało o happeningu, choć nie odbił się żadnym echem skandalu czy innymi odgłosami, my mieliśmy poczucie spełnienia ważnej misji. W stosunku do samych siebie i tych osób, zamkniętych w piwnicznym boksie.

Jeszcze jest jakaś nadzieja dla tego świata, jeśli ludzie, nawet w umownej formie, nawet w konwencji sztuki, przedstawienia, spektaklu, nie chcą podpisać wyroku śmierci na zupełnie obcego człowieka...

*2-a (egala) premio en la pola kategorio de la literatura konkurso
„Esperanto ligas homojn. Mia viv-aventuro”*

MAGNOLIA

La aventuro de mia vivo – geedzeco

La vivo en si mem estas aventuro. Serio de aventuroj. La aventuro de mia vivo? La plej granda aventuro? Malfacila elekto, kiam oni staras apenaŭ sur la dua vivobordo. Estis kelkaj. Vojagoj, libroj, patrineco, amo, laboro, pasiaj interesoj, amikecoj...

Mi volas skribi pri plej eksitanta aventuro de mia vivo, kiu estis mia geedzeco. Jes, jes, mi scias, ke ĉiuj vidvinoj idealigas siajn edzojn, sed mi neniam ion idealigis. Plej reale mi traktis ĉion, kio okazis al mi, kvankam mi devas konfesi, ke multaj okazintajoj kaj aferoj turniĝis nekutime. Kaj tute ne tiel, kiel mi tion volis.

Mia geedzeco estis realigo de revoj de tre junia knabino, kiu deziris ami kaj esti amata. De la proza vivo mi havis vagan imagon, sed tio estas la privilegio de juneco...

Ŝajnis al mi, ke mi rimarkas ĉi tiujn pli malfacilajn vivoflankojn, kio ne ŝanĝas la fakton, ke okazis al mi travivi dudek jarojn en la eksitanta rilato kun iu, kiu opiniis, ke ne estas limoj, ke li povas ĉion, ke ĉio estas al li atingebla. Alvenon de tio neebla oni devas nur iom pli longe atendi. Tiel estis. Ĝis certa momento.

Nu bone, mi komencis de la fino, sed ja...

En la domo de mia amikino mi lin ekvidis la unuan fojon. Mian kapon trapasis stranga penso – ĉi tiu knabo estos via edzo. Mi ne scias, de kie ĉi tiu penso kaj kial memvole aperis. Mi estis dekkvinjara, la unuan fojon mi vidis la knabon, li tute ne parolis kun mi, apenaŭ prezantis sin

al mi. Dum la tuta lernado en liceo tiu knabo, kiam min vidis, apenaŭ klinadis sian kapon, kio ŝajnis signifi – saluton! Li ne haltis, kiam mi iris al la lernejo, kvankam mi iris kelkajn pašojn antaŭ li aŭ malantaŭ.

Okaze de mia dekoka naskiĝtago miaj gepatroj permesis al mi fari solenaĵon. Mankis nur muziko, kaj konkrete magnetofono kun mojosaj surbendaĵoj, por ke la kamaradoj povu danci. Mi eksciis, ke tiel okazas, ke Gregoro (ĝuste ĉi tiu knabo) havas tian magnetofonon kaj bonajn surbendaĵojn. La aparaton sen priservo li ne pruntedonos. Li faros tion kun la kondiĉo, ke mi invitos ankaŭ lin. Mi invitis lin. Ekde tiu dekok-jarsolenaĵo ni fariĝis paro. Tia paro, kiaj italaj geedzoj. Disiĝoj, revenoj, kvereloj, disputoj, ĵaluzo. Ni maturiĝis unu al ka alia, unu apud la alia, unu kun la alia. La vera provilo de nia amo estis lia militservo. Du jaroj de leterskribado, sekretaj renkontiĝoj, dolora sopiro kaj multaj, multaj tentoj. Ĉirkaŭ mi floradis studenta vivo, aperadis iuj knaboj, mi estis juna, mi volis ludi. Kun granda helpo al Gregoro venis mia patro, homo de granda honoro. Li tre serioze traktadis nian fiancīgon. „La fingroringon vi prenis, nenien vi iros”, diris mia patro, kiam mi penis eliri al diskoteko.

En tiu situacio ni revis pri nenio alia ol pri tio, ke ni kune estus. Ni diras pri la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Ununura solvo – geedziĝi. Ekzakte unu semajnon post la reveno de Gregoro el ls militservo. Ne estis grave, ke ĉiu preparo restis sur la kapo de miaj gepatroj kaj sur la mia. Nenio konvinkis nin, ke ni almenaŭ iomete pli longe atendu. Eĉ ne unu momenton sen ni mem. Sole mi povis promesi, ke mi finos miajn studiojn. Mi komencis ĝuste tiam la kvaran jaron. Mi tenis la vorton. Tri semajnojn antaŭ la nasko de Petro mi defendis la magistran disertaĵon. Ekde unu jaro mi jam laboris kaj skribis ankaŭ la diploman laboron. Normalaj laŭordaj aferoj. Mi tiel pensis tiam. Post someraj ferioj mi revenis al lernejo, al laboro, kaj ĉiu okupiĝis po iomete pri la etulo. Ne estis facile, ho ve, ne! Veturado per buso al la alia fino de la urbo, skipa laboro, malgranda ĉambro ĉe la gepatroj. Io kontraŭ io. Mi sentis min tre plenkreska kaj ne volis, ke iu entrudiĝu en mian vivon, konsilu al mi. Mi volis vivi laŭ mia propra vidpunkto.

Ni enloĝiĝis en mizeran lu-ĉambron, sen akvo, necesejo, kun tradi-
cia hejtorno. Malnova domaĉo. Ununura avantaĝo – estis malmultekoste.
Tuj post la transloĝiĝo montriĝis, ke mi la duan fojon gravediĝis. Kiel
tio povis okazi? Mi ne povis ekkredi tion. Mi vidis nian estontecon nigra.

Iun tagon mi legis en gazeto, ke okazos la unua en nia urbo aŭkcio
por vendo de loĝejoj, kiuj estis transformitaj el laborista hotelo kaj renova-
igitaj ĝuste por bezonoj de la aŭkcio. Dek kvin malgrandaj loĝejoj en la
urbocentro. Ni aliris la aŭkcion. La loĝejo kostis cent naŭ milionojn. Tiel
granda inflacio de la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Ni havis naŭ.
Ne estis tiam hipotekaj kreditoj. La restintan kvoton pruntedonis niaj kon-
atoj kaj parencoj, en diversaj monsumoj. Neniu, al kiu ni turniĝis, rifuzis.
Eble pro tiu kaŭzo, ke mi estis graveda? Ni elaŭkciis la lastan loĝejon!
Tre grandega ĝojo. Ne gravis, ke la kvara etaĝo, ne gravis, ke sen balkono,
ne gravis, ke estis ŝuldoj. Tiel ĝuste okazis. Nia loĝejo kaj nur nia. Mi
ĉiam opiniis, ke antaŭ ol la infanoj iros en lernejon, devus havi propran
adreson. Tiel ĝuste okazis. La sekvaj jaroj estis malfacilaj, ĉiu el ni kun
po du laborpostenoj, hejmlaborado, ekonomia agado – renoviglaboroj
kaj finpretiligo de loĝejoj por enloĝiĝado. Ĉio por tio, ke ni povu ĉiun
monaton forstreki ion el nia deviglisto. La financa regimo estis terura.
Mi sentis min civitanino de la dua aŭ eĉ la tria kategorio. Ni ŝajne laboris,
tamen ĉion ni devis rifuzi al ni. La helpo de la gepatroj kaj bogepatroj
limigis sin al prizorgado de niaj infanoj. Tiam mi ne ĝuste aprecis tion.
Hodiaŭ, kiam mi mem estas avino, mi scias, kiom signifas prizorgado
de malgrandaj infanoj, kiam la homo estas en certa aĝo.

La vivo alportas al ni verŝajne tion, kio estas por ni plej neceso, sed
ne tion, kion ni deziras. Ĉu necesaj estis laborklopodoj? Ĉu bezonaj estis
sanproblemoj? Ĉu finfine nepre estis la morto en tiel dramaj cirkonstan-
coj, en tiel junaj aĝoj? Mi ne scias.

La dudekan datrevenon de nia geedziĝo mi pasigis en la sepultagent-
ejo. Konsternita, ne tute konscia de tio, kio vere okazis. Homamasoj. Tiel
estas, kiam forpasas en vivopleneco kvardekkelkjara viro. Mi rigardis
Gregoron senhelpa. Ankoraŭ antaŭ du tagoj mi kriis: Kial vi faris ĉi tion

al mi? Kaj li mortis ĝuste pro infarkto. Mi restis sola kun la infanoj, kun ne finita domo, kun kredito. Dio, kiel furioza mi estis en tia senhelpoco, en tia nebleco fari ion ajn, returni la faton. Tiaj estis niaj songoj. Ĉiuji songoj havas sian prezon, sed ĉu tiel altan? Tion certe mi ne sciis, ne antaŭvidis. Restis al mi ludi plej bone per tiuj kartoj, kiujn mi obtenis.

Mi estas dankema por la kunaj jaroj, por la infanoj, por la domo. La edzo infektis min per optimismo, luktovolo, obstino, konvinko neniam subiĝi. De jaroj mi gvidas diskutojn kun Gregoro, rememoras lian vortojn, kiam mi faras diversajn gravajn decidojn. Iam li aperis al mi en sonĝo tia kutima, reala. – Ĉu vi revenis? Vi ja ne estis! – mi kriis.

Li respondis al mi kviete:

– Tamen mi jam estas, mi estas.

Ekde tiu tempo mi scias, ke li estas inter ni, rigardas de supre min kaj niajn infanojn, ĝojas pro ĉiu sekva nepo aŭ nepino. En ĉiu el ili estas parteto de Gregoro. Pro tio la plej grava aventuro de la vivo senĉese daŭras kaj mi esperas, ke ĝi daŭros ankoraŭ longe...

El la pola tradukis Jerzy Parys

*II nagroda (ex aequo) w kategorii polskiego konkursu literackiego
„Esperanto łączy ludzi. Przygoda mojego życia”*

MAGNOLIA

Przygoda mojego życia – małżeństwo

Życie samo w sobie jest przygodą. Serią przygód. Przygoda mojego życia? Największa przygoda? Trudny wybór, kiedy się stoi prawie na drugim brzegu życia. Było tego trochę. Podróże, książki, macierzyństwo, miłość, praca, pasje, przyjaźnie...

Chcę napisać o najbardziej ekscytującej przygodzie mojego życia jaką było moje małżeństwo. Tak, tak wiem, że wszystkie wdowy idealizują swoich mężów, ale ja nigdy niczego nie idealizowałam. Jak najbardziej realnie podchodziłam do wszystkiego, co mnie spotykało, choć muszę przyznać, że wiele zdarzeń i spraw układało się niezwyczajnie. I wcale nie tak, jak tego chciałam.

Moje małżeństwo to realizacja marzeń młodziutkiej dziewczyny, która chciała kochać i być kochaną. O prozie życia miała mgliste wyobrażenie, ale to przewilej młodości...

Zdawało się, że bardziej dostrzegam te trudniejsze strony życia, co nie zmienia faktu, że przyszło mi przeżyć dwadzieścia lat w eksytyującym związku z kimś, kto uważały, że nie ma granic, że wszystko może, że wszystko jest w jego zasięgu. Na niemożliwe trzeba tylko trochę dłużej poczekać. Tak było. Do czasu.

No dobrze, zaczęłam od końca, a przecież...

W domu koleżanki zobaczyłam go po raz pierwszy. Przez głowę przeszła mi dziwna myśl – ten chłopak będzie twoim mężem. Nie wiem skąd ta myśl i dlaczego, tak po prostu się pojawiła. Miałam piętnaście lat,

pierwszy raz widziałam chłopaka na oczy, w ogóle ze mną nie rozmawiał, ledwie się przedstawił. Przez całe liceum ów chłopak kiedy mnie widział ledwie kiwał głową, co miało oznaczać – cześć. Nie zatrzymywał się, kiedy szłam do szkoły, choć szłam kilka kroków przed nim albo za nim.

